# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO


N° 208 APRILO 2001

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

Surkovrile

La Eklezio devas el-igi la izolitajn homojn de la popolamaso por doni al ili emon vivi.
Ĝi invitas nin imagi novajn spacojn kie Kredo eblas al modernaj epokoj.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 30.a de junio 2000. Venonta bulteno aperos en julio.

Finpresado la 23/04/2001


*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 208 Aprilo 2001**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen


Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
3,Allée du Beaujolais
93270 SEVRAN
<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com




# Le Mot du Président

Il est de bon ton chez certains intellectuels qui se veulent dans le vent, de présenter les chrétiens comme des gens vieux jeu, tristes,moroses et inadaptés à la vie actuelle.

Comme ils se trompent ! Comme ils connaissent mal le message évangélique plein de joie et d'espérance. Quoi qu'ils en pensent, quoi qu'ils en disent, le véritable chrétien vit dans l'espérance joyeuse de se savoir sauvé et aimé. Toute l'Ecriture révèle au croyant que,loin de craindre,il doit se réjouir et vivre dans la joie. David dansait pour le Seigneur au son des tambourins et des cymbales. Et lorsque l'ange a salué Marie c'est en lui déclarant "Réjouis-toi, pleine de grâce" . Elle même laissera éclater son allégresse dans le Magnificat. Et Jésus lui aussi ne cessera de dire à ses disciples d'être dans la joie et l'allégresse car notre récompense sera grande dans les Cieux (Mt 5,12). N'oublions pas non plus le bonheur promis à tous ceux qui vivront les Béatitudes, car cette joie, nous le savons, nul ne nous l'enlèvera (Jh 16,22)

Oui,le chrétien ,quoi qu'en disent les esprits chagrins, vit dans la joie et le bonheur d'être sauvé en espérance. Puissent nos visages refléter notre sérénité et notre contentement, alors que la fête de Pâques nous apporte l'Espérance qui fait tant défaut au Monde déboussolé dans lequel nous vivons.

# La Bileto de la prezidanto

Estas bonmaniere por certaj intelektuloj,kiuj deziras esti laùmodaj, prezenti la kristanojn, kiel eksmodajn, malĝojajn, morozajn kaj neadaptitajn homojn.

Kiel ili eraras ! Kiel ili malbone konas la evangelian mesaĝon, tutplena je ĝojo kaj espero ! Kion ajn ili opinias, kion ajn ili deklaras,la vera kristano vivas en la ĝojiga espero ekscii, ke li estas amata kaj savita. La tuta Skribo atestas la kredanton, ke, anstataù ol timi, li devas ĝojadi kaj vivi en la ĝojo. Davido dancis por la Sinjoro je la tonoj de la tamburinoj kaj cimbaloj . Kaj kiam la anĝelo salutis Marian, li deklaris al ŝi "Ĝojiĝu gracoplena" ,ŝi mem ekĝojegos en la Magnificat. Kaj Jesuo ankaù ne ĉesos diri al siaj disciploj esti en la ĝojego,ĉar nia rekompenso estos granda en la Ĉieloj (Mt 5,12). Kaj ni ja scias, neniu ekprenos al ni tiun ĝojon (Jh.16,22). Ni ne forgesu ankaù la feliĉon promesitan al ĉiuj,kiuj vivos la Beatecojn.

La kristano, kion ajn diras la tristemuloj, ja vivas en la ĝojo kaj la feliĉo esti savita en espero. Niaj vizaĝoj esprimu nian serenecon kaj nian kontentecon, kiam la Paskofesto alportas al ni la esperon, kiu tiel multe mankas al la konfuzita Mondo, en kiu ni vivas.



## HALELUJA

Kristo releviĝis el la mortintoj,
Leviĝu vi ankaù !
Kristo, kiu dormis, vekiĝas,
Vekiĝu vi ankaù !
Kristo eliras la tombon,
Liberigu vin el la peko-katenoj !

Per Kristo
Vi fariĝis nova kreitaĵo,
Renovigu vin !
Tio estas la Pasko de l'Sinjoro,
Tio estas la tempo de la resurekto
Kaj la komenco de la vera vivo ...

Kristo , kiu releviĝis el la mortintoj,
Renovigas ankaù min spirite
Kaj igas min esti Nova Homo.

## LA SAKTULO DE L'PRINTEMPO

Nudapiede paŝis
la Sanktulo
sur kampoj de la neĝo
tutkovritaj.
Kaj tuje jen la neĝo
fluidiĝis
ĝuste tie bela sun'
naskiĝis.
Kiam l'okulojn al ĉiel'
li levis,
ŝire breĉo lazura
jen aperis.

Se la buŝon malfermis
li ridete,
la tuta tero ŝajnis
paradizo.
Se li rigardis
al la horizonto,
jen aperis la flugo
de hirondo.
Monaĥoj mirrigardis
La Sanktulon,
kiu alportis la printempon
rave.

(Mariannina Caroselli
trad. Miriam Noseda).

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO
DE LA 24-A DE JANUARO 2001 EN PARIZO.

Ĉeestis: S-ro Bessière,Pastro Héroux,F-inoj Chaney kaj Michel, Ges-roj Lafargue,S-ro Chevalier,Colleu,Pons kaj Villeneuve.
Petis senkulpigon :S-roj Basso,S-ino Lafargue,F-to Marmou..
Observis: F-ino Hervier,S-ro Texier.

S-ro Villeneuve prezentis la financan raporton por la jaro 2000. Vi legos ĝin sur aparta paĝo. Li ankaŭ proponis monhelpi la konventon Sankta Jakobo, kie ni kunvenas, ĉar ĝi bezonas urĝajn riparojn. La komitato decidis donaci 1500 F .
La prezidanto agadraportis pri la jaro 2000. Vi legos aparte tiun raporton.
La pilgrimo en Lisieux estas preta. Ni esperu, ke ni estos sufiĉe multnombraj. La ĝenerala kunveno okazos en Lisieux dum la kongreso; ĉiu membro estos kunvokita per letero; en la tago oni elektos la kvar kandidatojn por la kvar vakantaj postenoj en la komitato.
S-ro Colleu transdonis al la sekretariino la ekzemplerojn de la meslibreto,kiun li preparis en bela vesto. Ili estos uzataj okaze de niaj diservoj.
S-ro Pons zorgos pri la diservo okaze de la nacia kongreso en Limoges,kunlabore kun la tieaj organizantoj.
La venonta komitatkunveno okazos en Lisieux la 6-an de majo 2001.



## AGADRAPORTO POR LA JARO 2000

En la jaro 2000 nia asocio ne kongresis sed tamen laboris por la disvastigado de esperanto en katolikaj medioj .

La 6-an de majo 2000 la ĝenerala kunveno okazis en Parizo kaj elektis Pastron Héroux kaj S-ron Chevalier Daniel ,kiel novajn komitatanojn. Ili anstataŭas Pastron Bourdon kaj S-ro Despiney, kiuj ne rekandidatiĝis pro sia grava aĝo. Ili ambaŭ multe laboris por nia asocio. P° Bourdon tutplena je vigleco kaj viveco ŝtampis nian asocion kaj lasos al ni ĉiuj la memoron de nobla kora homo, malfermita al la problemoj de la moderna mondo . S-ro Despiney , ĉiam afabla kaj ridetanta, estis dum pluraj jaroj la saĝa nestoro de niaj komitatkunvenoj. Ni sincere dankas ilin pro ilia eminenta agado.

Dum la pasinta jaro ni bedaŭris la forpason de S-ino Jeannine Vincent; ŝi estis nia kasistino kaj redaktorino de nia bulteno dum 28 jaroj. Elstaranta esperantistino, ŝi arde laboris por nia afero.

Dank'al S-ro Basso nia bulteno fariĝis agrabla kaj interesa informilo por niaj membroj. pro reklamo sur Franca Esperantisto kaj peranteco de Esperanto-France, kiu akceptas la abonojn al nia bulteno, novaj membroj venis al nia asocio.

S-ro Pons bone kontribuis al la eldonado kaj disdonado de la eta biblio "Dio parolas al siaj infanoj". 500 ekzempleroj estis venditaj kaj 1530 donacitaj al nepagipovantaj esperantistoj en la tuta Mondo.

En 2001 ni denove kongresos kaj samtempe pilgrimos en Lisieux.

Je la fino de la jaro 2000, nia asocio nombris 129 membrojn, do 4 pli ol en la jaro 1999.

## FINANCA RAPORTO 2000

| ENSPEZOJ | FF | ELSPEZOJ | FF |
|---|---|---|---|
| Kotizoj | 5422,00 | Bulteno | 1343,45 |
| Donacoj | 558,00 | Donacoj | 0,00 |
| Rentumo sparkaso | 0,00 | Korespondado | 844,72 |
| Kongresaj aligiloj | 60,00 | Komitatkunvenoj | 2063,50 |
| Kongreso | 1050,00 | Kongreso | 5000,00 |
| Libro eldonado | 0,00 | Libro eldonado | 0,00 |
| | | Posta takso | 9,00 |
| SUMO | 7090,00 | SUMO | 9260,67 |
| En la kaso 01/01/2000 | 24470,70 | En sparkaso | 12877,92 |
| Negativa | -2170,67 | En P.C.K | 9422,11 |
| Saldo | | | |
| En la kaso 31/12/2000 | 22300,03 | | 22300,03 |

La Kasisto : G. Villeneuve



## INSTRUU NIN

Maria nomado,
Kiel via patro Abrahamo
vi forlasas vian landon
por laùiri la vojon,
kiu kondukas de Nazareto al Bet-Lehemo,
Vi jam fide iras
sur la vojoj de la maltrankvilo.
Maria naskiĝo,
vi donas taglumon al la nova mondo.
Viaj brakoj, via koro estas malfermaj
por akcepti Dion-kun-ni.
En via rideto, en via tenero,
Li ja sin donas.
Maria, instruu nin
porti Dion en nia karno,
naski la vivon,naski la amon,
por la feliĉo de ĉiuj niaj fratoj.

(Laurent Grzybowski)
*en memoro de Jeannine Vincent,(†2000) ,kiu tradukis ĝin )*

Ni funebras kaj kondolencas .
Forlasis nin :
- **Pastro ANDREONI Francesco**,multjara misiisto en Tajlando de "Missions Etrangères de Paris",kie li instruis francan lingvon ,li mortis en Montbeton (F).(03-02-2001 -90-jara)
Al la familioj, sincerajn kondolencojn. Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiu kara amiko kaj frato en Kristo.

# En Nia Asocio:


Novaj membroj:


- S-ro VITTE René (01)
- S-ino BRET Régine (26)
- S-ino DE COUDENHOVE Claude (45)
- S-ro SEGUR Patrick (75)
- S-ino GOAN Solange (44)

**Bonvenon** al la genovuloj .

**LA KASISTO ALVOKAS !**
**ANTAU FORGESI PAGU TUJ VIAN KOTIZON 2001**

S-ro MEGIE Paul 4,Rue de l'Odet 44200 NANTES skribas :" Vi povas doni mian adreson, por ke mi povu ricevi amikajn vizitojn aù korespondi . Mi estas bedaùrinde hejme invalido. Dankojn kaj salutojn. "








# KALENDARO

## 2001

| | |
|---|---|
| 14/07 gîs 21/07 | ZAGREBO(Kroatio)<br>15-a Ekumena kongreso<br>54-a IKUE-kongreso<br>51-a KELI kongreso<br>5-a Junulara Ekumena Tendaro |
| 25/07 gîs 01/08 | ZAGREBO (Kroatio)<br>86-a Universala Kongreso de Esperanto |
| 29/07 gîs 05/08 | STRASBOURG (Francio)<br>57-a Internacia Junulara Kongreso<br>www.esperanto.org/ijk2001<br>Estos biciklan karavanon el Londono kaj el Barcelono. |
| 04/08 gîs 11/08 | SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomys<br>20-a IKUE E-Tendaro.<br>En tendara frateca kaj amikeca etoso<br>Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE . |
| 07/09 11/09 | BARZA D'ISPRA (VA) (Italio)<br>15a Itala Katolika E.o Kongreso |
| **2002** | Kromeriz (Ĉehio)<br>55a IKUE Kongreso<br>17 ĝis 24-a de aùgusto. |

# 15-a Ekumena Kongreso

**54-a de IKUE** **51-a de KELI**

**14 - 21 Julio 2001**

**en Zagreb, Kroatio**

## Nia temo

# *ADORU*

***La nova preĝ- kaj kantlibro de IKUE kaj KELI***

**Ni kongresos kune kun**

# 5-a JET'2001

**( 5-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro)**

**samtempe en la sama kongresejo, sed ofte kun aparta programo**

En la unua jaro de la 21-a jarcento kaj de la 3-a jarmilo de la Kristanismo ni rigardas antaŭen. Ĉi tiu kongreso estos la kongreso de nia portanta fundamento: **Nia Diservo**. Antaŭ ĉio ni volas kune vivi kristane, preĝante por plia progreso de unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo. Por pli bona preĝado estos je dispono la novan preĝ- kaj kantlibron ***ADORU***. Ni adoros Dion per Jesuo Kristo en la Spirito.

La kongreso okazos tuj antaŭ la UK Zagreb kune kun la 5-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro JET'2001. La ĉambroj disponeblas ankaŭ dum la UK.

Oni atentu la **speciale favorajn kotizojn por familioj kaj grupoj**. Tio estas la ŝanco, kunvenigi parencajn aŭ konatajn gejunulojn kaj familiojn al nia kristana Esperanto-renkontiĝo. Sed la nombro de subvenciitaj lokoj estas limigita al 30 gejunuloj kaj 6 familioj. Ju pli da Esperanto-konoj kaj -aktivadoj estas pruveblaj des pli granda estas la ŝanco ricevi subvenciitan lokon. Estas antaŭkondiĉo, ke la gejunuloj kaj infanoj jam antaŭ la kunveno komencis lerni Esperanton. Dum la kongreso ni donos kurson por komencantoj kun antaŭscioj kaj paroligan kurson.

La kotizoj inkluzivas ekskurson al la nacia kroata pilgrimejo Marija Bistrica.

Ni kore invitas vin aliĝi al nia 15-a Ekumena Kongreso Zagreb 2001
nome de la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI:

***Adolf BURKHARDT*** por KELI ***Bernhard EICHKORN*** por IKUE
kaj nome da la Loka Kongresa Komitato: ***Marija BELOŠEVIĆ***



## Aliĝilo

sendota al Marija BELOŠEVIĆ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

*Familioj kaj grupoj bezonas nur unu aliĝilon. La grup-estro aŭ unu el la gepatroj kruc-signu interkrampe kaj metu sian nomon en la nom-linion:*

Aliĝo al ✎ ( ) la 15-a Ekumena Kongreso aŭ al ✎ ( ) JET'2001 en Zagreb

Tuta nomo: ____________________

Bonvolu skribi vian **familian nomon MAJUSKLE** kaj la **personan nomon minuskle**

Adreso: ____________________

____________________

Lando (en Esperanto):____________ telefono: ____________

faksnumero: ____________ reta adreso: ____________

Sekso (signu inter la krampoj): ✎ ina ( ), ✎ vira ( ).

Mi deziras dividi la ĉambron kun: ____________

Mi/ni planas alveni je (dato kaj horo, se eblas): ____________

Mi/ni planas foriri je (dato kaj horo, se eblas): ____________

(Nur JET-anoj: La aer-linia distanco de mia loĝ-loko al Zagreb ĉ.:________km)

(Nur, se malpli ol 25-jara je 14.8.01, notu la naskiĝtagon: ____________)

**Familio aŭ grupo):** Kun mi venos:____________

*Skribu ĉi tie la nomojn kaj en krampoj la aĝojn (ĝis 25 jaroj)* ____________

**Loĝado**: *Legu unue la informojn sur la dekstra folio, duan parton!*

- Mi/ni mendas ✎ ( ) **plur-litan** ĉambron **en la kongresejo** (unu-litaj ĉambroj en la kongresejo nur en eksterordinaraj kazoj kun 30% kotiz-altiĝo; skribu aparte viajn kialojn, ekz. malfacila ir-kapablo, alta aĝo; du-litaj ĉambroj estas rezervitaj al geedzoj.)
- Ni estas geedzoj kaj petas ✎ ( ) **du-litan** ĉambron **en la kongresejo**.
- Mi/ni mendas **en la hotelo ILICA** ✎ ( ) unu-litan; ✎ ( ) 2-litan ĉambron ✎ ( ) 2-litan pli grandan ĉambron; ✎ ( ) 3-litan, ✎ ( ) 4-litan apartementon
- aŭ **en la hotelo JADRAN** ✎ ( ) unu-litan ✎ ( ) du-litan ĉambron
- Mi/ni ne mendas tranoktadon: ✎ ( )
- Mi/ni volas resti en la kongresejo ankaŭ dum la UK (sen manĝoj): ✎ ( )
- Mi/ni petas vegetarajn manĝaĵojn *(por kiom da personoj?)* ✎ por ( ) personoj

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo (temo, daŭro):*(Atentu, ke en la limigita tempo de la kongreso ne ĉiuj ofertoj povas esti prezentataj)*

____________________

____________________

***La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.***

**Pagmaniero:** Mi pagis la sumon de ____________ je la ____________

✎ ( ) al Banka konto Marija Belošević, Zagrebačka banka, Zagreb, Trg B.Jelačića 15, konto numero 2422034108

✎ ( ) al UEA-konto **belo-n**

## Kongresaj kotizoj

pageblaj en kunaoj (kroata mono) aŭ en valutoj de euro-landoj aŭ en US-dolaroj.

**Tarifo A:** Ĉiuj landoj sen B. **Tarifo B:** Eŭropa Unio, Skandinavio, Svisio, Nord-Ameriko

**1. Kongresa aliĝ-kotizo** (ne repagebla) por ĉiu persono:

| | | |
|---|---|---|
| ĝis 31.12.2000: | **A:** 5.- euroj; | **B:** 30.- euroj; |
| ĝis 31.3.2001: | **A:** 10.- euroj; | **B:** 40.- euroj; |
| ekde 1.4.2001: | **A:** 20.- euroj; | **B:** 50.- euroj; |

**2. Kongres-kotizo** aldone pagenda en la kongresejo:
2.1. Tranokto en 2-5-lita ĉambro por 1 persono: **A:** 150.- euroj; **B:** 230.- euroj
2.2. Sen tranoktoj, kun tag- kaj vespermanĝoj: **A:** 80.- euroj; **B:** 130.- euroj
2.3. Familioj 3 - 5 personaj (infanoj/junuloj ĝis 25 jaraj) ĉiuj en la sama ĉambro: **A:** 175,- euroj; **B:** 300,- euroj.

**3. Hotelaj prezoj** (euroj): 7 noktoj (enestas 10%-a rabato, nur per la kongresejo):

| ĉambro: | 1-lita | 2-lita | 2-lita granda | 3-lita apartemento | 4-lita apartemento |
|---|---|---|---|---|---|
| ILICA | 252 | 336 | 420 | 539 | 658 |
| JADRAN | 301 | 371 | --- | --- | --- |

**4. JET'2001-anoj** loĝos aparte, sed en la sama domo. Ili havas grand-parte propran junularan programon.
Partoprenantoj de JET'2001 el A-landoj, kiuj loĝas pli ol 500 km aer-distance de Zagreb, povas ricevi **vojaĝ-subvencion.** Se la loĝ-loko distancas de Zagreb pli ol 500 aer-liniajn km = 20.- euroj; pli ol 1000 aer-liniaj km = 40.- euroj; pli ol 1500 aer-liniaj km = 60.- euroj. Necesas demandi antaŭkongrese pastron B.EICHKORN.

**5. JET-anoj pagas jenajn JET-kotizojn:**
5.1. Unuopaj gejunuloj ĝis 25 jaroj: **A:** 90.- euroj; **B:** 140.- euroj
5.2. Familioj aŭ grupoj ĝis 5 personoj (1-2 responsaj plen-aĝuloj, kaj inkluzive de ĉiuj gejunuloj ĝis 25 jaroj): **A:** 175,- euroj; **B:** 300,- euroj.
Tiujn subvenciitajn kotizojn de 5.2. ni povas financi nur por limigita nombro de 30 personoj. Ju pli da Esperantaj konoj kaj aktivadoj ili pruvas antaŭ la kongreso, des pli granda estos ŝanco ricevi subvencion. Limdato: 1.5.2001. Detalojn demandu ĉe pastro Eichkorn.

---

**Adresoj** de la responsuloj de KELI, IKUE kaj de la LKK:

***Adolf BURKHARDT***, Gimpelweg 1, DE-73235 Weilheim/Teck,
fakso: + 49 7023 72413 < Adolf.Burkhardt@t-online.de >

***Bernhard EICHKORN,*** Romäusring 20,DE-78050 Villingen,
fakso: + 49 7721 22074, < Bernhard.Eichkorn@esperanto.de >

***Marija BELOŠEVIĆ*** Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb,
telefono: + 385 1 3745 052, <mbelosev@public.srce.hr>

---

Atentu la kutimajn informojn en DIA REGNO kaj ESPERO KATOLIKA, kaj krome la informojn daŭre aktualigotajn en: *http://home.t-online.de/home/st-fidelis*
**Ĉiuj aliĝintoj ricevos informbultenon, ĉu rete, ĉu per ordinara poŝto.**
La kongesurbo estas trafike bone ligita kun pluraj eŭropaj urboj: * **trajne:** horaro http://www.tel.hr/hz * **buse:** horaro http://www.tel.hr/autokol-zg * **aviadile:** horaro http://ww.croatiaairlines.hr * **ŝipe** ĝis Rijeka kaj daŭrigi per buso aŭ trajno, ŝiphoraro, http://www.tel.hr/jadrolinija * **informo por ŝoforoj:** Kroata aŭtoklubo http.//www.hak.hr

Kon: A:\ek2001invitilo3.wpd



## PATRINO DE SIBERIAJ MARTIROJ

Cent miloj da plej bonaj gefiloj de Litovio estis dissemitaj en Siberio kaj Nordo. Tie ili sklavis , suferis ,sinoferis kaj plimulto mortis. Tiuj,kiuj restis vivaj, laù siaj eblecoj faris tombejojn kaj starigis krucojn al la mortintoj. Parto da ili revenis al la Patrio, sed la tombejoj kaj starigitaj krucoj restis tie, ĝis kiam homoj kaj tempo transformos ilin en polvon.

Inter multaj relikvoj de la ekzilo en Siberio esceptan signifon havas bildo de la Patrino de Siberiaj Martiroj. Nun la bildo troviĝas en Okcidento, en kapelo de patroj jezuitoj en Ĉikago.

Tiun bildon faris nekonata vilniusano,ekzilito, el simpla lado forĝinta portreton de Dipatrino en pordego de Aùrora kaj fiksita ĝin al tabulo,tegita per ruĝa litkovrilo.

La bildon el Siberio forportis ekzilitoj, irantaj al armeo. Ili donis ĝin ĉe D-ro Zawadowski,ambasadoro de Pollando en Bejruto, kaj poste ĝi estis transdonita al protekto de litovaj jezuitoj en Ĉikago.

### GEOGRAFIA CENTRO DE EUROPO

Litovio estas ponto inter slavoj kaj germanoj, avanposteno de katolikismo en Meza/Orienta Eùropo, kruciĝejo inter ortodoksuloj kaj diversaj protestantoj el Okcidento, inter kristanoj de Okcidento (Romo) kaj Oriento (Konstantinopolo).

Litova lingvo estas mondgrava lingvistika monumento: ĝi estas la plej arkaika vivanta hindeùropa lingvo. Geografia centro de Eùropo troviĝas 26,5 km norde de Vilnius Koordinatoj de la centro: 54°55' da norda latitudo kaj 25°19' da orienta longitudo.

HISTORIA MISIO

Litovio: eksterordinara nacio kaj ŝtato kun unika historio kaj misio de tutmonda signifo.

En mezepoko ĝi detenis "Drang nach Osten" de germanoj, penetradon de tataroj kaj aliaj muzulmanoj al Orienta kaj Centra Europo.

Kune kun Pollando ĝi haltigis ekspansiono de Rusio al okcidento. Per senarmaj manoj kontraù sovetaj tankoj defendinte proklamitan sendependecon, ĝi inspiris kuraĝon kaj decidemon ankaù al aliaj nacioj strebi al libero.

"La nova erao, kronita per mirakloj de nia nacio, permesas al la mondo pli trankvile paŝi al XXIa jarcento".

Litovio estas lando de Maria, ankaù punkto de koncentriĝo de ĉiuj Eùropaj popoloj turmentitaj en Siberio.


La bildon de la Patrino de Siberiaj Martiroj kompletigas manuskripta preĝ-libreto "Maria,savu nin !", verkita en 1953 de kvar junlitovinoj ekzilitaj al Siberio. La libreto jam estas eldonita en lingvoj: litova, angla, germana, nederlanda, itala, hispana, portugala, franca kaj ĉina.



## *PREĜO AL LA PERANTINO DE ĈIA GRACO*

*(El Siberia preĝlibreto)*

*Ni laciĝis,*
*duonmortis niaj sentoj,*
*rigidiĝis la koroj,*
*ni ne plu komprenas proprajn pensojn.*
*Maria Plena de Graco,*
*Vi estas Perantino de Dia favoro,*
*kun afliktita koro*
*ni levas al Vi*
*niajn petegantajn manojn, -*
*revivigu nin,*
*diru al ni,*
*kion volas de ni*
*Via amata Filo.*
*Ni deziregas*
*plene sindoni al Lia volo.*
*La favorata Patrino, montru al ni*
*en nova ekbrilo*
*la stelojn*
*de viva kredo,*
*de senmorta espero*
*kaj de senlima amo.*
*Helpu al mi kaj al mia popolo*
*venki ĉiujn obstaklojn,*
*kiuj baras la vojon*
*al sino de Via Filo,*
*al abunda trezorejo de la Santa Koro.*
*Amen.*



*Kruco starigita en Centro de Eŭropo memore al Siberiaj martiroj en 1994*

# ANONCOJ

01/ Pli kaj pli estas uzataj la novaj komunikiloj : la reto INTERNET
jen kelkaj novaj TTT-paĝoj
- Kompleta manuskripto de
"Esperanto- la nova latino de la Eklezio"
http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/latina.htm

- Ekumena Ĉarto (Gvidlinioj por la kresko de kunlaboro inter Eklezioj en Eùropo)
http://www.ikue.org/ekumcarto.html

-Elektronika versio de DIO BENU (el Ĉehio)
-http:/mujweb.cz/Spolecnost/Svacek

02/ Filatelio: Baldaù aperos nova filatela esperanto stampo en la poŝtoficejo de Strasbourg-Gare . Ĝi estos uzata de la 7.05 ĝis la 4.08.2001
TekSto: "57ème Congrès Mondial des Esperantophones du 29.07 au 05.08.2001
"Le plurilinguisme au quotidien en Europe"

03/ TAKE-ESPERANTO serĉas produktantojn de ĉampanjo (Champagne), kaj tipaj francaj manĝajoj por vendi ilin per la reto . Se vi konas persone tiujn produktantojn bonvolu skribi al ni . Fakte ni bezonas permeson de la produktantoj por eldoni la etikedon kaj klarigon en esperanto+nacia lingvo. -> TAKE-ESPERANTO 90,Rue du Tiefenbach F-68920 WINTZENHEIM Fax:0389794333
Reto:100623.3022@compuserve.com (

# AUSKULTU VATIKANAN RADION

En esperanto la elsendoj okazas en tri tagoj de la semajno , en la sama horo 21.20 MET

DIMANĈE - Horo 21.20 laù mezeùropa tempo (10')
Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005 (74.90 m), 5880 (51.0m)
Satelite : INTELSAT 325,5° East 4097.75 Mhz Polarizadon LHCP

MERKREDE kaj JAUDE : Horo 21.20 MET
Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 7250(41.37m),9645(31.10m)
Satelite: INTELSAT 602.62° East 4097.100 Pol.LHCP)
Interreto: sama horo
http://www.vatican.va/news_services/radio/multimedia
aù http://www.vaticanradio.org )

# Kotiztabelo 2001

| | Frankoj | Euroj |
|---|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | 164 | 25,00 |
| Peranto : S-ro M. COLLEU 95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE . | | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto unuopulo : | 60 | 9,15 |
| geedza paro : | 80 | 12,20 |
| gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : | 30 | 4,57 |
| bonfaranto : | 200 | 30,50 |

Pagu al: S-ro VILLENEUVE G. 14,Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON je la nomo de ACFE

---

Dépot légal : 1er trimestre 2001 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO